

28 ĈINTAMANI KAJ BIRDOJ

„Hm," diris sinjoro doktoro Vitásek, „sciu, iom mi estas sperta pri la persaj tapiŝoj; sed tion mi konfirmas al vi, sinjoro Tausig, ke nuntempe ĝi ne estas plu tia, kia iam. Hodiaŭ la friponoj en Oriento ne plu penas kolori la lanon per koĉenilo, indigo, safrano, kamela urino, gajloj kaj la ceteraj noblaj organikaj farboj; eĉ tiu lano ne plu estas tia, kia ĝi estis, kaj se mi estu parolonta pri desegno, mi ekploraĉus. Nu, jen plua perdita arto, la persaj tapiŝoj. Tial nur la malnovaj tapiŝoj, faritaj antaŭ la jaro mil okcent sepdek, havas ian valoron; sed tiajn vi sukcesas aĉeti, nur kiam iu maljuna familio „pro familiaj kaŭzoj", kiel en pli bonaj familioj oni nomas ŝuldojn, vendas antikvaĵojn post avo. Aŭskultu, antaŭ nelonge mi vidis en kastelo Rožmberk aŭtentikan transilvanan tapiŝon - ili estas tiaj malgrandaj tapiŝetoj, preĝtapiŝoj, kiujn faradis turkoj, en la deksepa jarcento, kiam ili sidis en Transilvanio; tie en la kastelo tretas ilin turistoj en najlazitaj botoj, kaj neniuj scias, kian valoron ili havas - nu oni plorus super tio. Kaj unu el la plej raraj tapiŝoj de l' mondo estas ĉe ni en Prago, kaj neniuj scias pri ĝi.

Nome estas jene: Mi estas konata kun ĉiuj komercistoj de tapiŝoj, kiuj estas ĉe ni, kaj iam sinsekve mi vizitas ilin, por rigardi, kion ili havas en sortimento; sciu, tiuj agentoj el Anatolio aŭ Persio tamen iam ekkaptas iun malnovan pecon, ŝtelitan en moskeo aŭ ie, kaj alpakas ĝin al la cetera ordinara varo; la tuta paketo, estu en ĝi kio ajn, estas poste vendata laŭ pezo. Kaj mi opinias, nu, se ili alpaku tien iun Ladik'on aŭ Bergam'on! Tial iam mi hastvizitas tiun aŭ alian tapiŝiston, eksidas sur amaso da tapiŝoj, fumetas kaj rigardas, kiel oni vendas al nespertuloj tiel nomatajn Buĥara-tapiŝojn, Saruk-tapiŝojn kaj Tabris-tapiŝojn; kaj iam-tiam mi diras, nu kion vi havas tie sube, tion flavan? Kaj jen, ĝi estas Hamadan'o. Tiel mi vizitadas de temp' al tempo iun sinjorinon Severýnová -

28 ĈINTAMANI A PTÁCI

„Ehm," ŝeĝis pan doktor Vitásek, „vite, ja se tak trochu v perských kobercích vyznám; ale to vám potvrdím, pane Taussig, že dnes už to není, jak to bývalo. Dnes si ti taškáři v Orientě už nedají tu práci, aby barvili vlnu červcem, indigem, šafránem, velbloudí močí, duběnkami a těmi ostatními ušlechtilými organickými barvivy; ani ta vlna už není, jako bývala, a kdybych měl povídat o vzoru, tak bych se dal do breku. To teda je jedno ztracené umění, tyhle perské koberce. Proto jenom ty staré kusy, co byly dělány před rokem osmnáct set sedmdesát, mají nějakou cenu; ale takové se vám podaří koupit, jenom když nějaká stará famílie ‚z rodinných příčin‘, jak se v lepších rodinách říká dluhům, prodává antikvity po dědečkovi. Poslouchejte, já jsem onehdy na hradě Rožmberku viděl pravý sedmihraďák – to jsou takové malé koberečky, modláky, co vyráběli Turci v sedmnáctém století, když seděli v Sedmihradsku; tam na tom hradě po tom šlapou turisti v okovaných botách, a nikdo neví, jakou to má cenu, – inu, člověk by nad tím zplakal. A jeden z nejvzácnějších koberců na světě je u nás v Praze, a nikdo o něm neví.

Totíž to je tak: Já se znám se všemi obchodníky s koberci, co u nás jsou, a někdy si je tak obejdu, abych se podíval, co mají na skladě; vite, oni ti agenti v Anatólii a Persii někdy přec jenom popadnou nějaký starý kus, ukradený z mešity nebo odkud, a přibalí jej k tomu druhému metrovému zboží; ten celý balík, ať je v něm co je, se potom prodává na váhu. A já si tak myslím, jakpak kdyby tam přibalili nějaký Ladik nebo Bergamo! Proto si někdy zaskočím k tomu nebo onomu tepicháři, sednu si na hromadu koberců, pokušuju a koukám, jak prodávají kavkám takové ty buchary, saruky a tebrizy; a sem tam řeknu, copak to máte tamhle vespod, ten žlutý? A hele, on to je hamadan. Tedy takhle jsem si občas zašel k nějaké paní Severýnové –

ŝi havas butikon en korto en Malnova Kvartalo kaj iam oni trovas ĉe ŝi belajn Karaman'ojn kaj Kelim'ojn. Ŝi estas tia ronda kaj gaja sinjorino, multparolema kaj ŝi havas hundinon pudelon, tiom dikan, ke eĉ naŭzas. La dikaj hundoj estas mishumoraj, kaj tial ili astme kaj incite bojas; tion mi ne ŝatas. Aŭskultu, ĉu iu el vi jam vidis junan pudelon? Mi ne; mi opinias, ke ĉiuj pudeloj, simile kiel ĉiuj inspektoroj, revizoroj kaj impost-oficestroj estas maljunaj; tio apartenas plej versimile al la raso. Sed ĉar mi volis konservi bonan volon kun sinjorino Severýnová, ĉiam mi sidiĝis en angulon, kie ronkis kaj anhelis tiu hundino Amina sur granda, kvadrata faldita tapiŝo kaj frottiklis ĝian dorson; tion Amina ege ŝatis.

Sinjorino Severýnová, mi diras foje, kiaj malbonaj negocoj; tiun tapiŝon, sur kiu mi sidas, vi havas ĉi tie jam tri jarojn. Eĉ pli longe ĝi estas ĉi tie, diris sinjorino Severýnová, ĝi estas lokita en la angulo certe jam dek jarojn; sed ĝi ne estas mia tapiŝo. Ha, mi diras, ĝi apartenas al Amina. Tute ne, ridis sinjorino Severýnová, ĝi apartenas al iu sinjorino; ŝi diras, ke hejme ne havas lokon por ĝi kaj tial ŝi lokis ĝin ĉi tie. Ĝi sufiĉe obstaklas ĉe mi, sed almenaŭ Amina dormas sur ĝi, ĉu Amina?

Mi retiris randon de la tapiŝo, kvankam Amina komencis furioze murmuregi. Jen ia malnova tapiŝo, ĉu estas permesite rigardi ĝin? Kial ne, diris sinjorino Severýnová kaj prenis Aminan en la brakojn. Venu Amina, sinjoro nur rigardos kaj poste al Amina denove sternos. Ŝŝ, Amina, ci ne darfis murmuregi! Lasu, ci malsaĝa!

Dume mi disfaldis la tapiŝon, kaj mia koro ekbategis. Ĝi estis blanka anatolia tapiŝo el la deksepa jarcento, iuloke jam komplete irtruita, sed sciu, ĝi estis tiel nomata birdtapiŝo kun desegno de Ĉintamani kaj kun birdoj; ĝi estas nome dieca kaj malpermesita desegno. Mi diras al vi, ĝi estas grandega raraĵo; kaj jen ĉi tiu ekzemplero estis almenaŭ kvinoble ses metrojn granda, bele blanka, kun turkisa bluo kaj ĉeriza rozkoloro ... Mi stariĝis al fenestro, por ke sinjorino Severýnová ne vidu en mian vizaĝon, kaj diras:

ona má takový krámeček ve dvoře tamhle na Starém Městě a někdy se u ní najdou pěkné karamany a kelimy. Ona je taková kulatá a veselá paní, má mnoho řečí a čubičku pudla, tak tlustou, že se až člověku dělá špatně. Tihle tlustí psi jsou takoví nevrlí a tak astmaticky a podrážděně štěkají; já to nemám rád. Poslouchejte, viděl už někdo z vás mladého pudla? Já ne; já myslím, že všichni pudlové, podobně jako všichni inspektoři, revidenti a berní správcové, jsou staří; to už nejspíš patří k té rase. Ale protože jsem chtěl udržovat dobrou vůli s paní Severýnovou, sedl jsem si vždycky do kouta, kde chrápala a funěla ta čubička Amina na takovém velkém, do čtverce složeném koberci, a drbal jsem ji na zádech; ona to ta Amina měla moc ráda.

Paní Severýnová, povídám jednou, to jsou špatné obchody; ten koberec, co na něm sedím, už tady máte tři roky. Ten tu je ještě dýl, řekla paní Severýnová, ten je v tom koutě složen už dobrých deset let; ale to není můj koberec. Aha, povídám, ten patří Amině. Kdepak, smála se paní Severýnová, ten patří jedné paní; ona říká, že na něj nemá doma místo, a tak si jej složila tady. Mně tu dost překáží, ale aspoň na něm spí Amina, vid', Amino?

Tak jsem odhrnul cíp toho koberce, třebaže Amina začala vztekle vrčet. To je nějaký starý koberec, povídám, smím se na něj podívat? Pročpak ne, řekla paní Severýnová a vzala Aminu do náruče. Pojd', Amino, pán se jenom podívá a pak to zas Amině ustele. Pšt, Amino, nesmíš vrčet! Ale jdi, ty hloupá!

Já jsem zatím ten koberec rozhodil, a mně vám tak zabouchalo srdce. On to byl bílý anatolák ze sedmnáctého století, místy už naveskrz prochozený, ale abyste věděli, byl to takzvaný ptačí koberec se vzorem Ĉintamani a s ptáky; to totiž je božský a zapovězený vzor. Já vám říkám, to je nesmírná rarita; a tady ten kus byl aspoň pětkrát šest metrů veliký, krásně bílý, s tyrkysově modrou a třešňově růžovou... Já jsem se postavil k oknu, aby mně paní Severýnová neviděla do obličeje, a povídám:

Ĝi estas ege malnova ĉifono, sinjorino Severýnová, kaj ĉi tie ĝi kuŝdifektiĝos. Sciu, diru al sinjorino, ke mi ĝin aĉetos, se ŝi ne havas lokon por ĝi.

Tio estas malfacila, diris sinjorino Severýnová. La tapiŝo ne estas ĉi tie por vendo, kaj ŝi, la sinjorino, estas senĉese en Merano kaj Nico. Mi eĉ ne scias, kiam ŝi estas hejme. Sed mi provos ŝin demandi. Nu, estu tiel bona, mi diris laŭeble indiferente kaj iris al miaj aferoj.

Vi devas scii, ke por kolektanto estas afero de honoro ricevi iun raraĵon por bagatelo. Mi konas iun tre grandan kaj riĉan sinjoron, kiu kolektas librojn; al li estas egale doni por iu malnova senvalora libro eĉ kelkmilojn, sed se li sukcesas aĉeti ĉe iu brokantisto la unuan poemendonon de Jan Krasoslav Chmelenský por du kronoj, li saltas pro ĝojo. Tio estas jam tia sporto, kiel ĉamĉasado. Mi metis do al mi en la kapon, ke la tapiŝon mi devas malkare ricevi kaj poste mi donacos ĝin al muzeo, ĉar tia objekto ne apartenas aliloken. Nur devus esti sur tio karteto kun surskribo: Donaco de doktoro Vitásek. Mi petas, ĉiu homo havas sian ambicion, ĉu? Sed mi konfesas, ke mia kapo brulis pro tio.

Nu, necesis al mi granda peno venki min kaj ne kuri tuj la sekvintan tagon al la tapiŝo kun Ĉintamani kaj birdoj; pri io alia tute mi ne povis pensi. Ankoraŭ unu tagon mi devas elteni, mi diradis al mi ĉiutage; tion mi faris spite al mi mem. Oni iam ŝatas suferigi sin.

Sed proksimume post du semajnoj mi ekpensis, ke la birda tapiŝo povas esti tie trovita de iu alia, kaj mi kuregas al sinjorino Severýnová. Nu kio? mi hastvortigas en pordo. Nu, kio estu? demandis min mirigite la sinjorino, kaj mi rekonsciiĝis. Nu, mi diras, ĝuste mi iras tra ĉi tiu strato kaj hazarde mi rememoris la blankan tapiŝon; ĉu la sinjorino vendos ĝin? Sinjorino Severýnová kapskuis. Tute ne, ŝi diris, nun ŝi estas en Biarritz kaj neniu scias, kiam ŝi revenos. - Mi ekrigardis do, ĉu la tapiŝo tie estas; memkomprene sur ĝi kuŝis Amina, pli dika kaj pli kalvaĉa ol iam ajn, kaj atendis, ke mi grattiklos ĝin surdorse.

To je ĥodně starý hadr, paní Severýnová, a tady se vám nadobro přeježí. Víte co, řekněte té paní, že to koupím, když ona na to nemá místo.

To je těžké, řekla paní Severýnová. Ten koberec tu není na prodej, a ona ta paní je pořád v Meranu a v Nizze; já ani nevím, kdy je doma. Ale já zkusím se jí zeptat. Tak buďte tak hodná, řekl jsem co možná lhostejně a šel jsem po svém.

Abyste věděli, to je pro sběratele věc cti, aby nějakou vzácnou věc dostal za babku. Já znám jednoho moc velkého a bohatého pána, který sbírá knihy; jemu je jedno dát za nějakou starou šartěku třeba pár tisíc, ale když se mu podaří u nějakého hadráře koupit první vydání básní Josefa Krasoslava Chmelenského za dvě koruny, tak vám skáče radostí. To už je takový sport, jako honit kamzíky. Tedy já jsem si vzal do hlavy, že musím ten koberec lacino dostat a že jej pak daruju muzeu, protože taková věc jinam nepatří. Jenom by na to musela přijít cedulka s nápisem: Dar doktora Vitáska. Prosím vás, každý člověk má svou ctižádost, že? Ale to se vám přiznám, mně z toho hořela hlava.

To mně vám dalo práci, abych se přemohl a neběžel hned druhého dne za tím kusem s Ĉintamani a ptáky; já jsem na nic jiného ani nemohl myslet. Ještě den to musím vydržet, říkal jsem si každého dne; dělal jsem to sám sobě natruc. Člověk se někdy rád trýzní.

Ale asi za čtrnáct dní mě napadlo, že tam ten ptačí koberec může najít někdo jiný, a letím k paní Severýnové. Tak co? vyhrknu ve dveřích. Co má být? ptala se mě udiveně ta paní, a já jsem se vzpamatoval. Ale, řekl jsem, jdu zrovna tudyma po ulici a náhodou jsem si vzpomněl na ten bílý koberec; prodá to ta paní? Paní Severýnová potřásla hlavou. Kdepak, řekla, ona je teď v Biarritzi a nikdo neví, kdy se vrátí. – Tak jsem se podíval, je-li tam ten koberec; to se ví, ležela na něm Amina, tlustší a olezlejší než kdy jindy, a čekala, že ji podrbu na zádech.

Kelkan tempon poste mi devis veturi en Londonon, kaj kiam mi estis jam tie, mi vizitis sinjoron Keith - sciu, tiu siro Douglas Keith estas nuntempe la plej granda eksperto pri orientaj tapiŝoj. Sinjoro, mi diras al li, mi petas vin, kian prezon povus havi ekzemple blanka anatolia tapiŝo kun Ĉintamani kaj birdoj, grandeco pli ol kvinoble ses metrojn? Tiu sinjoro Douglas ekrigardis min tra okulvitroj kaj abruptas preskaŭ furioze: Nenian! Kial nenian, mi diras embarase. Kial ĝi havus nenian valoron? Ĉar en tia formato tia tapiŝo tute ne ekzistas, kriis al mi siro Douglas. Sinjoro, tion vi povus scii, ke la plej granda tapiŝo kun Ĉintamani kaj birdoj, entute konata, havas mezuron apenaŭ trioble kvin jardojn! Mi ekruĝis pro ĝojo. Sed ni supozu, sinjoro, mi diris al li, ke ekzistus unu peco en tia grandeco; kian valoron ĝi povus havi? Mi diras al vi ja, nenian, kriis tiu Keith. Sinjoro, tiu peco estus unikaĵo, kaj kiel vi volas difini prezon de unikaĵo? Se iu objekto estas unikaĵo, ĝi povas same bone havi valoron de mil funtoj aŭ de dek mil funtoj; ĉu scias mi? Cetero tia tapiŝo ne ekzistas, sinjoro. Bonan tagon, sinjoro.

Vi scias imagi, kiel mi revenis. Virgino Maria, tiun tapiŝon kun Ĉintamani mi devas akiri! Jen io por muzeo! Sed nun, mi petas vin, imagu al vi, ke mi darfis neniel suspektige urĝi, ĉar tio ne estas kolektista; ĉar sinjorino Severýnová havis nenian specialan intereson pri tio, ke la malnova ĉifono, sur kiu kuŝaĉis Amina, estu vendita; kaj ĉar la malbenita virino, al kiu apartenis la tapiŝo, veturadis de Merano al Ostende kaj de Badeno al Vichy - tiu ino nepre havis hejme ian medicinan leksikonon, ĉar ŝi havis tiom da malsanoj; ŝi estis senĉese en iu banloko.

Mi iradis do proksimume unufoje en du semajnoj al sinjorino Severýnová por rigardi, ĉu tie en la angulo ankoraŭ estas la tapiŝo kun ĉiuj siaj birdoj, mi grattiklis la abomenan Aminan, ĝi pro ĝuo kvivitis, kaj por ke tio ne estu suspektiga, ĉiam mi aĉetis ian tapiŝon;

Nĕjaký den nato jsem musel jet do Londýna, a když už jsem tam byl, zašel jsem si k panu Keithovi – víte, ten sir Douglas Keith je dnes největší kapacita na orientální koberce. Pane, povídám mu, prosím vás, jakoupak cenu by takhle mohl mít bílý anatol s Ĉintamani a ptáky, velikost víc než pĕtkrát šest metrů?

Ten sir Douglas se na mne podívá přes brejle a utrhne se skoro vztekle: Žádnou! Jak to, žádnou, povídám zaraženĕ. Proĉ by nemĕl žádnou cenu? Protože v tom formátu ten koberec vŭbec neexistuje, křičel na mne sir Douglas. Pane, to byste mohl vědĕt, že ten největší koberec s Ĉintamani a ptáky, co je vŭbec znám, mĕří stĕží třikrát pĕt yardů! Já jsem vám zrudnul radostí. Ale dejme tomu, pane, řekl jsem mu, že by jeden kus v té velikosti existoval; jakou by mohl mít cenu? Vždyť vám přece říkám, žádnou, křičel ten Keith. Pane, ten kus by byl unikát, a jakpak chcete určit cenu unikátu? Když je nĕjaká věc unikát, může mít stejně dobře cenu tisíc liber jako deset tisíc liber; copak já vím? Ostatně takový koberec neexistuje, pane. Dobrý den, pane.

To si dovedete představit, s jakou jsem se vracel. Panenko Maria, ten kus s Ĉintamani musím dostat! To bude něco pro muzeum! Ale teď si, prosím vás, představte, že jsem nesměl nijak nápadně naléhat, protože to není sbĕratelské; že paní Severýnová nemĕla žádný zvláštní zájem na tom, aby se ten starý hadr, co se na něm její Amina válela, prodal; a že ta zlořeĉená ženská, co jí ten koberec patřil, jezdila z Meranu do Ostende a z Badenu do Vichy, – ta ženská musela mít doma nĕjaký lékařský lexikon, že mĕla tolik nemocí; zkrátka byla bez ustání v nĕjakých lázních.

Tedy já jsem tak jednou za ĉtrnáct dní chodil k paní Severýnové mrknout si, je-li tam v koutĕ ještě ten koberec se všemi svými ptáky, podrbal jsem tu odpornou Aminu, až rozkoší kviĉela, a aby to nebylo nápadné, koupil jsem pokaždĕ nĕjaký koberec;

aŭdu, hejme mi havas da Ŝiraz'oj, Ŝirvan'oj, Mossul'oj, Kabristan'oj kaj da alia ordinara varo tutajn amasojn, sed inter ili estis unu klasika Derbent, sinjoro, tion oni ne tuj vidas; kaj unu malnova blua Khorasan'o. Sed kion mi dum la du jaroj elsuferis, tion komprenos nur kolektanto; Ba, amturmentoj, tute nenio kompare al suferoj de kolektanto; sed ĉe tio estas stranga, ke eble ankoraŭ neniuj kolektanto finigis sian vivon kaj kontraŭe kutime atingas longan aĝon; plej versimile ĝi estas saniga pasio.

Iun tagon subite diras al mi sinjorino Severýnová: „Tiu sinjorino Zanelli, al kiu apartenas la tapiŝo, estis ĉi tie; mi diris al ŝi, ke mi havus aĉetanton por ŝia blanka kuŝtapiŝo kaj ke certe ĝi kuŝdifektiĝos ĉi tie; sed ŝi diris, ke ĝi estas familia tapiŝo, ke ŝi ne bezonas ĝin vendi kaj mi lasu ĝin ĉi tie.

Mi mem ekrapidis do, memkomprene, al tiu sinjorino Zanelli. Mi opiniis, ke ŝi estas dioscias kia mondanino, sed ŝi estis tia malbela maljunulino kun violkolora nazo, peruko kaj ia stranga tiko, ke ŝia buŝo senĉese moviĝis sur la maldekstra vango ĝis la orelo. Sinjorino moŝto, mi diras, kaj dume mi devas senĉese rigardi, kiel ŝia buŝo dancas sur la vango, ŝate mi aĉetus tiun vian blankan tapiŝon; ĝi estas ja jam malnova peco, sed al mi ĝi konvenus por ... por antaŭĉambro, jes. - Kaj dum mi atendis ŝian respondon, mi sentis, ke ankaŭ mia buŝo komencis konvulsii kaj moviĝi al la maldekstra flanko; ĉu ŝia tiko estis infekta aŭ ĉu tio estis pro ekscito, tion mi ne scias, sed mi ne povis tion reteni.

Kion vi permesas al vi? ekkriis sible al mi tiu terura virino. Tuj malaperu, tuj, tuj, ŝi sirenis. Ĝi estas mia familia peco post Grosspapa! se vi ne foriros, mi vokos Polizei! Mi vendas neniajn tapiŝojn, mi estas de Zanelli, sinjoro! Mary, tiu homo iru for! Aŭskultu, mi kuregis desur la ŝtuparo kiel bubo; mi ploraĉus pro furiozo kaj bedaŭro, sed kion mi povis fari?

Dum la tuta jaro denove mi iradis al sinjorino Severýnová; dume Amina ellernis grunti, tiom ĝi estis dika kaj preskaŭ tute kalva.

poslouchejte, já mám doma těch širazů, širvanů, mosulů, kabristanů a jiného metrového zboží celé hromady – ale mezi tím byl jeden klasický derbent, pane, to se tak hned nevidí; a jeden starý modrý khorasan. Ale co jsem za ty dva roky zkusil, to pochopí jenom sběratel. Kdepak, muka lásky, to nic není proti mukám sběratele; ale přitom je zvláštní, že si snad ještě žádný sběratel nevzal život a naopak obyčejně dosahuje dlouhého věku; nejspíš to je zdravá vášeň.

Jednoho dne mně najednou povídá paní Severýnová: Tak ta paní Zanelliová, co jí patří ten koberec, tady byla; já jsem jí řekla, že bych měla kupce na ten její bílý ležák a že se jí tu beztoho přeलेží; ale ona povídala, to prý je rodinný kus, a ona to prý nepotřebuje prodávat a jen ať to prý tady nechám.

Tak jsem se, to se rozumí, rozběhl sám za tou paní Zanelliovou. Myslel jsem, že to je bůhvíjaká mondéna, ale ona vám to byla taková šeredná bába s fialovým nosem, parukou a takovým divným tikem, že jí pořád huba jezdila po levé tváři až k uchu. Milostivá, povídám, a přitom se pořád musím dívat, jak jí ta huba tancuje po tváři, já bych rád koupil ten váš bílý koberec; on je to sic už chatrný kus, ale mně by se zrovna hodil do... do předsíně, víte? – A jak jsem čekal na její odpověď, cítím, že mně taky začala huba cukat a poskakovat na levou stranu; byl-li ten její tik nakažlivý nebo bylo-li to z rozčilení, to nevím, ale já jsem vám to nemohl potlačit.

Co si to dovolujete? rozkřikla se na mne ta strašná ženská pisklavě. Hned ať jste pryč, hned, hned, ječela. To je můj rodinný kus po Großpapa! Jestli nepůjdete pryč, já zavolám Polizei! Já neprodávám žádné tepichy, já jsem von Zanelli, pane! Máry, ať jde ten člověk pryč! Poslouchejte, já jsem z těch schodů jel jako kluk; já bych byl brečel vztekem a lítostí, ale co jsem měl dělat?

Po celý rok jsem zase chodil k paní Severýnové; zatím se Amina naučila chrochtat, jak byla tlustá a skoro úplně lysá.

Post unu jaro denove revenis sinjorino Zanelli; ĉi-foje mi rezignis kaj faris aferon, pro kiu mi kiel kolektanto hontu ĝis la morto: mi sendis kontraŭ ŝi mian amikon, advokaton Bimbal - li estas tia delikata homo kaj havas barbon, kiu havigas al li senliman konfidon ĉe virinoj, - por ke li proponu al la honorinda sinjorino por la birda tapiŝo kian ajn prudentan sumon. Dume mi atendis malsupre, ekscitita kiel fianĉo, kiu estas ricevonta respondon.

Post tri horoj ŝanceliris tiu Bimbal el la domo kaj viŝis la ŝviton. Ci kanajlo, li siblis je mi, mi strangolos cin! Kial mi meritas aŭskulti pro ci dum tri horoj historion de familio Zanelli? Kaj sciu, li ekkriis venĝeme, la tapiŝon ci ne ricevovos; dek sep Zanelli turniĝus en tombo sur Olŝany, se ĉi tiu familia memoraĵo devus veni en muzeon! Jesumaria, kion ci preparis al mi! - Kaj post tio li forlasis min.

Nu, vi scias: se viro ekobstinis pri io, li ne tiel facile cedas; kaj se li estas kolektanto, li iros do eble murdi; la kolektado estas tute heroa agado. Unue mi decidiĝis, ke la tapiŝon kun Ĉintamani kaj birdoj simple mi ŝtelos.

Unue mi prispanionis la ĉirkaŭaĵon; la butikoj de sinjorino Severýnová estas en korto, sed la trairejo estas ŝlosata vespere je la naŭa; kaj mi volis nenion malŝlosi pere de dirko, ĉar tion mi ne scias. El la trairejo oni iras en kelon, kie oni povas sin kaŝi, pli frue ol oni ŝlosas la domaĉon. En la korto estas ankoraŭ lignobudo; se oni atingus tegmenton de la lignobudo, oni povus transgrimpi en la najbaran korton, kiu apartenas al gastejo, kaj el la gastejo oni ĉiam iel malaperas.

Ĝi estis do sufiĉe simpla, sed temis nur pri tio, kiel malfermi fenestron al la butikoj. Por tiu laboro mi aĉetis vitristan diamanton kaj lernis sur propraj fenestroj, kiel eltranĉi vitrotabuleton. Aŭskultu, ne opiniu, ke ŝteli estas iel simpla; ĝi estas pli malfacila ol operacii prostaton aŭ senrenigi homon. Unue malfacila estas, ke neniu onin vidu. Due, kun tio estas ligita multa atendado kaj alia malkomforto. Kaj trie, ĉe tio estas ia malcerto; oni ne scias, kion oni renkontos.

Za rok se zase paní Zanellová vrátila; tentokrát jsem rezignoval a udělal jsem věc, za kterou bych se jako sběratel měl do smrti stydět: poslal jsem na ni svého kamaráda, advokáta Bimbala – on je takový jemný člověk a má vousy, které mu získávají bezmeznou důvěru u ženských –, aby té ctihodné dámě nabídl za ten ptačí koberec jakékoliv rozumné peníze. Zatím jsem čekal dole, rozčilený jako ženich, který má dostat odpověď.

Za tři hodiny se potácel ten Bimbal z domu a utíral si pot. Ty holomku, sípal na mne, já tě uškrťm! Jakpak já k tomu přijdu, abych kvůli tobě tři hodiny poslouchal historii rodiny Zanellovi? A abys věděl, rozkřikl se mstivě, ten koberec nedostaneš; sedmnáct Zanellovi by se na Olšanech obracelo v hrobě, kdyby ta rodinná památka měla přijít do muzea! Ježíšmarjá, tys mně dal! – A s tím mě nechal stát.

Teda to víte: když si chlap něco vezme do hlavy, tak hned tak nepovolí; a když je to sběratel, tak půjde třeba vraždit; ono je sběratelství docela heroická činnost. Tedy já jsem se rozhodl, že ten koberec s Ĉintamani a ptáky jednoduše ukradnu.

Nejdřív jsem si očíhнул okolí; ten krám paní Severýnové je ve dvoře, ale průchod se v devět hodin večer zamyká; a já jsem nechtěl nic odemkat pakličem, protože to neumím. Z toho průchodu se jde do sklepa, kde by se člověk mohl schovat, dřív než se barák zamkne. Na dvorku je ještě kůlnička; kdyby se člověk dostal na střechnu té kůlničky, mohl by přelézt do sousedního dvorku, který patří k hospodě, a z hospody už se člověk dostane vždycky.

Tedy to bylo dost jednoduché, ale šlo jen o to, jak otevřít okno do krámu. Na tu práci jsem si koupil sklenářský diamant a učil jsem se na svých vlastních oknech, jak se vyřízne tabulka skla. Poslouvejte, nemyslete si, že krást je tak jednoduché; to je těžší než operovat prostatu nebo vykuchat z člověka ledvinu. Předně je těžké, aby člověka nikdo neviděl. Za druhé je s tím spojena spousta čekání a jiného nepohodlí. A za třetí je při tom taková nejistota; člověk neví, nač narazí.

Mi diras al vi, ke ĝi estas malfacila kaj malbone honorariata metio. Se mi trovus rabiston en mia loĝejo, mi prenis lin je la mano kaj dirus al li mole: Homido, kial vi emas tiel vin ĝeni; rigardu, ĉu estas eble, ke vi priŝteladu homojn per alia, por vi multe pli oportuna maniero?

Kompreneble, mi ne scias, kiel ŝtelas la aliaj; sed miaj spertoj ne estas tro favoraj. La krizan vesperon, kiel oni diras, mi ŝteleniris la domon kaj kaŝis min sur ŝtuparo, kondukanta al la kelo. Tiel priskribus tion polica raporto; fakte ĝi aspektis tiel, ke mi vagis duonhoron en pluvo antaŭ la pordego, pro kio mi iĝis al kiu ajn iel suspektinda. Fine malespere mi decidiĝis, simile kiel decidiĝas homo por eltirigo de dento, kaj mi eniris en la koridoron; kaj memkomprene, mi karambolis kun ia servistino, iranta en la apudan gastejon por biero. Por trankviligi ŝin mi murmuris al ŝi, ke ŝi estas burĝono aŭ katido, aŭ io simila; tio konsternis ŝin tiel, ke ŝi ekkuris. Dume mi kaŝis min sur la ŝtuparo al la kelo; tiuj aĉuloj havis tie lokitajn kuvetojn kun cindro kaj alian fatrason, kiu grandparte dum mia tiel nomata enŝteliĝo falis kun granda bruo. Poste revenis la servistino kun la biero kaj ekscitite anoncis al domservisto, ke en la domon trudvenis ia fremda ulo. Sed tiu bonega viro ne lasis sin ĝeni kaj deklaris, ke tiu estis versimile ia drinkemulo, kiu eraris vojon al la apuda gastejo.

Kvaronhoron poste, oscedante kaj kraĉtusante li ŝlisis la pordegon kaj estis silento. Nur ie supre laŭte kaj izole singultis servistino - estas strange, kiel la servistinoj potence singultas, plej eble pro nostalgio. Al mi komenciĝis esti malvarme, kaj krome, estis tie ia acidaĉa kaj ŝima fetoro; mi palpis ĉirkaŭ mi, sed ĉio, kion mi ektuŝis, estis iel muka. Miadio, tie devis resti manspuroj post fingroj de doktoro Vitásek, nia eminenta specialisto pri malsanoj uretraj! Kiam mi opiniis, ke estos jam meznokto, estis nur la deka. Mi volis komenci mian enŝteliĝon meznokte, sed je la dek unua jam mi ne povis tion elteni kaj mi iris ŝteli.

Já vám říkám, že to je těžké a špatně honorované řemeslo. Kdybych našel lupiče ve svém bytě, vzal bych ho za ruku a řekl mu měkce: Človíčku, že se vám chce tak se obtěžovat; koukejte se, nešlo by to, abyste okrádal lidi jiným, pro vás pohodlnějším způsobem?

Já ovšem nevím, jak kradou jiní; ale mé zkušenosti nejsou příliš příznivé. Kritického večera, jak se říká, jsem se vloudil do toho domu a ukryl jsem se na schodech vedoucích do sklepa. Tak by to popsal policejní raport; ve skutečnosti to vypadalo tak, že jsem se půl hodiny potloukal v dešti před vraty, čímž jsem se stal kdekomu jaksi nápadný. Konečně jsem se zoufale rozhodl, tak jako se člověk rozhoduje dát si vytrhnout zub, a vešel jsem do chodby; a to se rozumí, srazil jsem se s nějakou služkou, která šla do té vedlejší hospody pro pivo. Abych ji uklidnil, zabručel jsem na ni, že je poupátko nebo kotě nebo něco takového; to ji poděsilo tak, že se dala na útěk. Zatím jsem se schoval na těch schodech do sklepa; ti prasáci tam měli stát kýble s popelem a jiné haraburdí, které větším dílem při mém takzvaném vloudění s velkým rachotem spadlo. Potom se vracela ta služka s pivem a rozčileně hlásila domovníkovi, že do baráku vlezl nějaký cizí chlap. Ale ten výtečný muž se nenechal vyrušit a prohlásil, že to byl asi nějaký mazavka, který si spletl cestu do vedlejší hospody.

Čtvrt hodiny nato zívaje a chrchlaje zamkl vrata a bylo ticho. Jen někde nahoře hlasitě a osaměle škytla služka – to je zvláštní, jak tyhle služby mocně škytají, nejspíš ze stesku. Mně začalo být zima, a krom toho to tam tak nakysle a plesnivě páchlo; hmatal jsem kolem sebe, ale všechno, nač jsem sáhl, bylo jaksi slizké. Panebože, tam muselo zůstat otisků po prstech doktora Vitáška, našeho vynikajícího odborníka na nemoci cest močových! Když jsem myslel, že už bude půlnoc, bylo teprve deset hodin. Já jsem chtěl se svým vloupáním začít o půlnoci, ale v jedenáct hodin jsem to už nemohl vydržet a šel jsem tedy krást.

Vi ne kredus, kian bruon kaŭzas homo volanta ŝteliri en mallumo; sed tiu domo havis benitan dormon. Fine mi estis ĉe tiu fenestro kaj komencis tranĉi la vitron kun terura knarado. Ene ĝi obtuze ekbojis. Jesuomaria, tie estas Amina!

Amina, ci bestaĉo, mi flustris, estu silenta; mi iras frotkaresi cian dorson. - Sed vi scias, estas ege malfacile en mallumo surmeti diamanton en la saman entraĉon, kiun vi antaŭe faris; per la diamanto mi zigzakis sur la tabulo, ĝis fine iom mi ekpemis kaj la tuta tabulo kun tintego krevis. Jen, nun alkuros homoj, mi diris al mi, kaj rigardas, kie mi kaŝu min; sed nenio. Poste jam kun ia perversa trankvilo mi elpuŝis pluajn tabuletojn kaj malfermis la fenestron; interne Amina de temp' al tempo nur duonfaŭke kaj konvencie ekbojis, por ŝajnigi, ke ĝi plenumas sian devon.

Mi enrampis do tra la fenestro kaj ĵetas min unue al la abomena hundinaĉo. Amina, mi flustras al ĝi arde, kie estas cia dorso? Rigardu, oro, sinjoro estas cia amiko - ci bestaĉo, tio plaĉas al ci, ĉu? Amina tordiĝis pro ĝuego, kiom nur sakego povas tordiĝi; kaj mi diras al ĝi amike: Nu, kaj nun lasu, hundaĉo! kaj mi volis de sub ĝi eltiri la multvaloran birdtapiŝon.

Nun Amina, plej versimile diris al si, ke temas pri ĝia havaĵo, kaj komencis bleki; sed tio ne estis bojado, ĝi estis blekego. Jesumaria, Amina, mi admonas ĝin rapide, estu silenta, ci bestaĉo! Atendu, mi sternos al ci ion pli bonan! Krak! Mi ŝirprenis desur la muro abomenan brilan Kirman'on, kiun sinjorino Severýnová konsideris plej altvalora aĵo de sia komercejo. Rigardu, Amina, mi flustras, sur ĉi tio ci bele dormos!

Amina kun intereso rigardis min; sed apenaŭ mi etendis manon al ĝia tapiŝo, denove ĝi ekblekegis; mi opiniis, ke tio certe estas aŭdebla ĝis Kobylisy. Nu, denove do mi ekstazigis la monstron per aparte rava tiklado kaj prenis ĝin en la brakojn; sed kiam mi ektuŝis la blankan unikajon kun Ĉintamani kaj birdoj, ĝi astme stertoris kaj komencis insulti.

To byste nevěřili, jaký hluk ztropí člověk, když se chce plížít potmě; ale ten dům měl pozeňnaný spánek. Konečně jsem byl u toho okna a začal jsem s děsným skřipáním řezat sklo. Uvnitř to dušeně zašteklo. Ježíšmarjá, ona tam je Amina!

Amino, šeptal jsem, ty potvoro, buď tiše; já tě jdu podrbat na zádech. – Ale ono je, víte, potmě ukrutně těžké nasadit diamant do téhož vrypu, který jste udělali předtím; tak jsem tím diamantem jezdil po té tabuli sem a tam, až jsem konečně trochu víc přitlačil a celá tabule s řinkotem praskla. Tak, teď se seběhnou lidé, řekl jsem si, a koukám, kde bych se schoval; ale ono nic. Pak už jsem s jakýmsi zvrhlým klidem vymáčkl další tabulky a otevřel okno; uvnitř Amina chvílemi jen tak na půl huby a konvenčně zaštekla, aby předstírala, že plní svou povinnost.

Já tedy jsem vlezl oknem a vrhnu se nejdřív k té ohavné čubičce. Aminko, šeptám jí horoucně, kdepak máš záda? Koukej, zlato, pán je tvůj přítel – ty potvoro, to se ti líbí, vid'? – Amina se slastí svíjela, pokud se ovšem žok může svíjet; a já jí přátelsky povídám: Tak, a teď pusť, čokle! a chtěl jsem zpod ní vytáhnout ten drahocenný ptačí koberec.

Teď si Amina nejspíš řekla, že jde o její majetek, a začala řvát; to nebylo štekání, to byl řev. Ježíšmarjá, Amino, domlouvám jí honem, buď tiše, ty bestie! Počkej, já ti ustelu něco lepšího! A rup! Strhl jsem ze zdi ohavný lesklý kirman, který paní Severýnová považovala za nejvzácnější kus svého obchodu. Koukej, Amino, šeptám, na tom se ti bude hajat!

Amina se na mne se zájmem dívala; ale sotva jsem vztáhl ruku po jejím koberci, spustila nový řev; já myslel, že to musí být slyšet až v Kobylisích. Tu teda jsem tu obludu znovu uvedl do extáze zvláště rozkošným podrbáním a vzal jsem ji do náruče; ale jak jsem sáhl po bílém unikátu s Ĉintamani a ptáky, zachřčela astmaticky a začala nadávat.

Diomia, ci bestio, mi diras deprimite, mi devas cin mortigi. Aŭskultu do, mi mem tion ne komprenas; mi rigardis tiun abomenan, grasan, fian hundaĉon kun la plej sovaĝa malamo, kiun mi iam ajn en mi eksentis, sed mi ne povis tiun bestaĉon mortigi. Mi havis bonan tranĉilon, mi havis rimenon sur pantalono; mi povis ĝin subtranĉi aŭ strangoli, sed mi ne havis koron por tio.

Mi sidis apud ĝi sur tiu dieca tapiŝo kaj tiklis ĝin post la oreloj. Ci malkuraĝulo, mi flustris al mi, sufiĉas nur unu du movoj kaj ĉio finita; ci operaciis tiom da homoj kaj vidis ilin mortantaj en teruro kaj doloro, kial ci ne mortigus hundon? Mi grincigis la dentojn, por kuraĝigi min, sed mi ne povis; kaj tial mi ekploraĉis - mi opinias, ke tio estis pro honto. Kaj jen Amina ekjelpis kaj ĉirkaŭlekis mian vizaĝon. Ci aĉa, porka, fia bestaĉo, mi ekmurmuris al ĝi, frapetis ĝin sur la kalva dorso kaj rampis tra la fenestro en la korteton; tio estis jam malvenko kaj retiriĝo.

Poste mi volis salti sur la lignobudon kaj atingi trans la tegmenton la duan korteton kaj tra la gastejo eksteren, sed mi ne havis eĉ eron da forto, aŭ la tegmento estis pli alte, ol mi taksis ĝin pli frue; mallonge mi ne atingis ĝin. Denove mi derampis do sur la ŝtuparon ĉe la kelo kaj staris sur ĝi ĝis mateno, duonmorta pro laco. Mi idioto, mi povis dormi sur la tapiŝoj, sed tiu ideo ne venis al mi.

Matene mi aŭdis, kiel la domservisto malŝlosas la pordegon. Momenton mi atendis, kaj poste alcelis rektvoje eksteren. En la pordego staris la domservisto, kaj vidante eliri el la koridoro fremdan homon, estis tiel surprizita, ke li forgesis alarmkrii.

Post kelkaj tagoj mi iris viziti sinjorinon Severýnová. En la fenestro alfiksita krado, kaj sur la sankta desegno Ĉintamani, memkomprene kuŝetendiĝas la abomeninda hunda bufo; ekvidinte min, ĝi eksvingetis ĝojgite per dika kolbaso, al kiu ĉe aliaj hundoj oni diras vosto. Sinjoro, radiis je mi sinjorino Severýnová, jen nia ora Amina, nia trezoro, nia kara hundeto; ĉu vi scias, ke antaŭ nelonge enŝteliĝis tra la fenestro al ni ŝtelisto, kaj nia Amina forpelis lin?

Proboha, ty bestie, řekl jsem zničeně, já tě musím zabít! Teda poslyšte, já tomu sám nerozumím; díval jsem se na toho hnusného, tučného, podlého čokla s tou nejdívočejší nenávistí, jakou jsem kdy v sobě zažil, ale já jsem tu potvoru nemohl zabít. Měl jsem dobrý nůž, měl jsem na gaticích řemen; mohl jsem ji podřezat i zaškrtit, ale já neměl to srdce.

Seděl jsem vedle ní na tom božském koberci a drbal jsem ji za ušima. Ty zbabělče, šeptal jsem si, stačí jenom jeden nebo dva pohyby, a bude to odbyto; operovals tolik lidí a viděls je umírat v hrůze a bolesti; proč bys nezabil psa? Já jsem vám skřípal zuby, abych si dodal odvahy, ale nemohl jsem; a tu jsem se vám dal do breku, – já myslím, že to bylo z hanby. A tu ta Amina zakňučela a olízla mně tvář. Ty mizerná, sviňská, ničemná mrcho, zabručel jsem na ni, poplácal jsem ji po tom olysalém hřbetě a lezl jsem oknem na dvorek; to už byla porážka a ústup.

Potom teda jsem chtěl vyskočit na tu kůlničku a dostat se po střeše na druhý dvorek a hospodou ven, ale já vám neměl ani krapet síly, nebo ta střecha byla výš, než jsem ji dřív odhadoval; zkrátka nedostal jsem se na ni. Tak jsem zase slezl na ty schody u sklepa a stál jsem na nich do rána, polomrtev únavou. Já blbec, já jsem mohl spát na těch kobercích, ale to mě nenapadlo.

Ráno jsem slyšel, jak domovník otvírá vrata. Chvilku jsem počkal a pak jsem si to namířil rovnou ven. Ve vratech stál ten domovník, a když viděl vycházet z chodby cizího člověka, byl tak překvapen, že zapomněl udělat randál.

Za pár dní jsem šel navštívit paní Severýnovou. V okně jsou přidělány mříže, a na posvátném vzoru Ĉintamani, to se rozumí, se válí ta mrzká psí ropucha; když mne viděla, zavrtěla potěšeně tím tlustým jelitek, kterému se u jiných psů říká ocas. Pane, zářila na mne paní Severýnová, to je naše zlatá Amina, náš poklad, náš drahý pejsek, víte, že se nám sem ondyno vloupal oknem zloděj a že ho naše Amina zahrnala?

Sinjoro, mi donus ĝin por nenio en la mondo, ŝi deklaris fierege. Sed vin ĝi ŝatas, sinjoro; ĝi ekkonas ja honestan homon, ĉu Amina? Jen ĉio. La unika birda tapiŝo kuŝas tie ĝis nun - estas, mi opinias, unu el la plej raraj tapiŝoj en la mondo kaj ĝis hodiaŭ gruntas sur ĝi pro feliĉego, malbela, fava, fetora Amina. Mi opinias, ke iam pro la graso ĝi sufokiĝos kaj poste eble mi provos tion denove: sed pli frue mi devas ellerni, kiel oni fajlas kradojn."

Pane, já bych ji nedala za nic na světě, prohlásila s pýchou. Ale vás má ráda, pane; to ona poctivého člověka pozná, vid', Amino? Tak to je všechno. Ten unikátní ptačí koberec tam leží podnes, – je to, myslím, jedna z nejvzácnějších tapiserií na světě; a podnes na ní chrochtá blahem šeredná, prašivá, smrdutá Amina. Já myslím, že se jednou sádlem zadusí, a pak to snad zkusím znovu: ale dřív se musím naučit, jak se pilují mříže."